# FRANCA

LA HOUSSAYE EN BRIE
77610 FONTENAY TRESIGNY
FRANCE

# KATOLIKA ESPERANTISTO

★ Organo de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO-ASOCIO, filio de I. K. U. E. ★

(Association Catholique Française pour l'Espéranto)

Prezidanto : S-ro R. CL. COLAS,- 6, rue de Mézières - 75006 PARIS.
Sekretario : S-ro R. DESPINEY,- 43, quai de Champagne -
94170 LE PERREUX SUR MARNE
Kasistino : S-ino J. VINCENT, rue des Oiseaux,- 27700 LES ANDELYS
C.C.P.- Association Cathol. Fr. pour l'Espéranto - ROUEN -23 24 93 N.-
=== le N° : 1,50 Fr;--- Abono : 5 Fr-; kotizo : 1 Fr-;--- sume : 6 Fr-===
::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::
Redaktorino : S-ino J. VINCENT, rue des Oiseaux,- 27700 LES ANDELYS.
Sendu la meterialon por la bulteno antaù la 20-a de marto,
la 20-a de junio, la 20-a de septembro, la 20-a de decembro.
++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++
---- N° 100 --- BULLETIN TRIMESTRIEL ---- TRIMONATA BULTENO -----

Sankta PIO-a, preĝu por ni.

--- Aprilo 1974 ----

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

ENHAVO :


paĝoj :

| | | | |
|---|---|---|---|
| 2 | : Bileto de la prezidanto | " 7 & 8 | : Nia kongreso en Angers |
| 3 | : Kredo kaj Eklezio | " 6 | : Gaudeamus |
| 3 & 4 | : Lingva angulo | " 5 & 6 | : Anoncoj - Nia membraro |
| 5 | : Protokolo de la konsilia kunveno | " 7 | : Distra angulo |
| | | " 8 | : Kotiztabelo |


xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

AMASE VENU AL ANGERS 11/12-an de majo 1974 (v.n° 99) !

KONGRESO DE FKEA sub la honorprotektado de M-oro Mazerat, episkopo.

KONGRESEJO : Villa Ste-Anne, 23, rue Edouard Guinel 49000 ANGERS

ALIĜOJ : S-ro R. Despiney, 43, quai de Champagne,
94170 LE PERREUX SUR MARNE

C.C.P.- PARIS - 14 703 97 - R. Despiney -

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

KALENDARO 1974 ...

20:27 an de julio 74 - la 3-a kongreso de kristanaj esperantistoj,
-IKUE-KELI Kongreso en la Jugendpark-Hamburg-Langenhorn,
Jugendparkweg 60,- D.2 HAMBURG 62 - FR. Germanujo.
Kongr. kasistino : F-ino Helga Brodthage, Reichardstr. 17-II,
D-2 HAMBURG 50 (Altona) FR. Germanujo.
27/7-3/8/74 = 59-a Universala Kongreso de Esperanto; HAMBURG .
Konstanta adreso : U.K. de Esperanto, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam3002

# B I L E T O   D E   L A   P R E Z I D A N T O

Nous devons au Pape JEAN XXIII la découverte, par les chrétiens, d'une évidence : la nécessité de rendre le Christ présent au monde d'aujourd'hui.

Cachée par l'amoncellement des faits historiques, des traditions des querelles de tous les temps, cette vérité s'est révélée avec une force explosive, et l'on peut dire qu'elle est allée au plus profond de la conscience de tous ceux qui se réclament de l'Eglise du Christ. C'est avec clarté qu'est apparue, au-delà des divisions, l'importance de la proclamation, par tous, du message évangélique qui est notre commun patrimoine.

Si la démarche oecuménique est longue et difficile, c'est le devoir de notre mouvement de s'y associer et de travailler, selon notre vocation propre, à son progrès dans lemonde. Espérantistes Catholiques, sans rien abandonner de ce qui est notre propre personnalité, nous devons nous efforcer de nous ouvrir aux autres, de leur donner notre amitié, de nous sentir plus proches dans la prière et la charité.

Notre journée d'Angers, à laquelle Monseigneur Mazerat a accepté d'accorder son patronage, doit être l'occasion de méditer ensemble sur ce thème, et de mieux comprendre comment la langue internationale constitue un puissant moyen pour avancer ensemble vers ce but. Puissions-nous participer nombreux à cette rencontre que nous souhaitons aussi ouvertes que possible à nos amis espérantistes même non catholiques, conquis à l'idée que la culture de notre temps ne peut être qu'universelle et tendre à une union plus grande des hommes de tous les pays et de tous les modes de pensée.

C'est dans le même esprit que se prépare le congrès IKUE-KELI qui doit se tenir à Hambourg (20 au 27 Juillet) en prélude au Congrés Universel qui se tiendra dans la même ville les jours suivants. Catholiques et protestants consacreront ces journées à un dialogue dont les revues leurs présenteront les sujets; les organisateurs proposent à ces congressistes de prolonger ensemble leur séjour s'ils ne désirent pas participer au Congrés Universel, pendant une semaine qu'ils espèrent fructueuse et attrayante.

Je termine ce billet en souhaitant à chacun de participer aux activités de cette année, de se retrouver nombreux à Angers afin de nous permettre de mieux nous connaître; j'invite tout particulièrement ceux qui ne peuvent venir à adresser à notre Secrétaire Général leurs idées, suggestions, afin qu'il en soit tenu compte tant au cours du congrés que dans les décisions qui orientent l'action au cours de l'

# K R E D O   K A J   E K L E Z I O .

Aktoj 5-27/33-

..."Kaj oni alkondukis ilin kaj starigis ilin antaŭ la sinedrio. Kaj la ĉefpastro ilin demandis, dirante : Ni severe ordonis al vi, ke vi ne instruu en ĉi tiu nomo; kaj jen vi plenigis Jerusalemon per via instruado, kaj intencas survenigi sur nin la sangon de tiu homo. Tiam Petro kaj la apostoloj responde diris : Oni devas obei Dion prefere ol homojn. La Dio de niaj patroj levis Jesuon, kiun vi pereigis, pendigante lin sur lignaĵo. Lin altigis Dio per Sia dekstra mano,por esti Estro kaj Savanto, por doni al Izrael penton kaj pardonadon de pekoj. Kaj mi estas atestantoj de ĉi tiuj vortoj, kiel ankaŭ estas la Sankta Spirito, kiun Dio donis al tiuj, kiuj Lin Obeas. Kaj ili, aŭdinte tion, estis pikitaj en la koro, kaj ili konsoliĝis, por pereigi ilin."...

Meditado : La mondo ne estas tuŝata de la atesto denoncanta ĝiajn erarojn; ĝi daŭre repuŝas la akuzon, ke ĝi elverŝis la Dian sangon. Vidalvide al la mondblindeco, la Eklezio estas devigata atestadi pri la savo fare de la Kruco, frenezaĵo por la saĝuloj. Nenia povo rajtas sufoki la voĉon de Dio; neniu sukcesos nuligi, ke Dio relevigis Sian Filon kaj ekzaltis Lin kiel Savanton.

(el Vie Chrétienne N° 156)

=====================================================================

# L I N G V A   A N G U L O .

Novaj respondoj al la proponoj de N° 98 venis de S-ro Broise(B), S-ino Michau (M) kaj 5 ge-Nantes-anoj (5).

1) bonfarti, fortike sani, - kiel karpeno (B); naturfavore bonfarti(M).
2) esti ĝenata kiel la etaj ŝuoj (B); esti premĝenata (M); esti premata en la ŝuoj(5).
3) forigi kontakteblecon (M); tranĉi reirvojon (5).
4) rankore resenti (M)
5) diskrete observi (M).
6) sentembre paroli (M).
7) ambicio jukas al li (B); konsumiĝe ambicii (M); esti varata de ambicio (5).
8) ne konsenti kompromitiĝon, eviti ajnan respondecon (B); rifuzi kompromitriskon (M); neniel trempiĝi en ion (5).
9) tion li ne kunportos en paradizon, mi venĝos min antaŭ lia morto (B) io ne mildigos lian vivofinon (M); ni repagigos lin antaŭ la morto (5)
10) naĝi en oro (5).

Al la proponoj de N° 99 venis tradukoj de S-roj Bourgois (B), Dauchez (D), Guillon (G), Jahier (J), Kraemer (K) kaj S-ino Michau (M).

.../...

.../...

1) rire du bout des dents : trude ridi (B); sindevigie ridi (B,K); nur ŝajne ridi (D); rideti pripensante ian malagrablaĵojn (G);; ne sincere ridi (J,K); penege ridi (J); malvolonte ridi (K); ne elkore ridi (M).

2) c'est bonnet blanc et blanc bonnet : estas nenia diferenco (B,K); tio estas tute sama (D); ambaŭ esprimoj havas samam signifon (G); tio estas kvazaŭ blanka ĉapo kaj malnigra ĉapo, estas la samaĵo, sed malsama prezentita (J); sama afero (M).

3) se mêler de ce qui ne nous regarde pas : ŝovi la nazon en fremdan vazon (B,K); okupiĝi pri afero, kiu ne koncernas nin (D,G); sin miksi en aliulajn aferojn (J); interveni ne koncernate (M).

4) donner du jeu : movebligi (B); faciligi la funkciadon (D); iomete larĝigi (G);faciligi la movon (J,K); helpi malstreĉecon, ebligi elastecon (M).

5) faire la part du feu : konsenti la necesajn cedojn (B); forlasi tro riskan parton (D); foroferi tion, kion oni ne povas savi (G); parte fajoferi por savi ion (J); fari la necesajn oferojn por savi la ceteron (K); konsenti etan perdon por savi la ceteron (K); konsenti etan perdon por eviti grandan (M).

6) mettre sa main au feu : nepre aserti ion (B,J,K); esti tute certa (D); nepre garantii pri ia aserto (G); certigi punriske (M).

7) abattre ses cartes : malkovri al iu siajn intencojn (B); diri siajn pensojn (D); malkaŝi sian plenumitan manovron (G); malkaŝi sian ludon, celon (J);diskonigi ion kaŝitan (M).

8) être aux abois : esti en ekstrema situacio (B,J); esti senrimeda, esti kiel cervo ĉirkaŭata de ĉasistoj (D); urĝe serĉi pruntedonontajn (G); suspekti danĝeron (M).

9) accorder ses violons : interkonsenti (B); kongruigi siajn dirojn(D); unuigi siajn konkludojn (G); esti en akordo (J); samcele kunkonsenti(M).

10- acquérir ses titres de noblesse : famiĝi (B); pruvi sian sperton(D); akiri bonegan famon (G); akiri la famon (J); distingiĝi pro merite (M)

La honorpalmon al S-ro Bougois, kiu proponas al vi : 1) accrocher le regard; 2) par acquit de conscience; 3) faire une action d'éclat; 4) l'affaire est dans le sac; 5) affirmer son autorité; 6) être dans les affres de la mort; 7) qu'il aille se faire cuire un oeuf !; 8) aimable comme une porte de prison; 9) ne pas avoir l'air d'y touvher; 10) avoir l'air absent.

-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-

## Protokolo de la konsilia kunveno de la 3-a de marto 1974

ĉeestis : S-ino Vincent, F-to Marmou, S-roj Colas, Despiney, Ligot, kaj, kiel observantino S-ino Camy.

Petis senkulpigon : S-to Baudry, S-ino Vanneau, S-roj Bessière kaj Ribot

La kunveno okazis en la sidejo de U.F.E. en Parizo posttagmeze. ĝin komencis kaj finis la preĝo "Patro Nia".

I- La protokolo de la antaŭa kunveno de la konsilio estis legata kaj unuanime aprobita.

II- Pri la Diservo okaze de la Nacia Kongreso de UFE en St-Etienne estis legataj leteroj de nia amiko Thiollière kiu surloke kaj zorge preparas la renkonton.

III- Preparado de la Nacia Kongreso de Franca Katolika Esperanto-Asocio en Angers 11/12 Majo 74.

La sekretario legis la liston de la unuaj aliĝintoj inter kiuj S-ro Bachelier ĉefredaktoro de la "Ponteto".

Pri la renovigo de la konsilio li indikis la eksiĝon de Pastro Baudry kaj S-ro Ribot sed, plezure li anoncis la kandidatiĝon de S-to Degrelle (Nancy) kaj Pastro Bourdon (Lille).

ĉar restas unu vaka posteno, tiu ĉi estos proponita al laik(in)o.

La sekretario raportas pri sia renkonto en Parizo kun S-to Goudé la 1-an de februaro, pri la informoj senditaj de la L.K.K. de Angers pri la artikoloj senditaj al pluraj gazetoj por veki la atenton de la publiko.

Nia prezidanto, S-ro Colas proponas ke oni invitu la legantojn de nia bulteno fari sugestojn por montri sian intereson al nia kongreso.

Pri la buĝeto 1974-1975, F-to Marmou rimarkigas ke bedaŭrinde estos necese pligrandigi la antaŭviditan elspezon pro la nunaj ĝeneralaj ekonomiaj malfacilaĵoj.

IV- Diversaĵoj.

- Diversaj leteroj estis legataj kiuj okazigis diversajn komentojn.
- La ĝ.s. faris la analizon de la sliparo entenanta la adresojn de niaj legantoj.
- La venonta konsilia kunveno okazos la 12-an de majo en Angers.

protokolis Roger Despiney.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

ANONCOJ

1) Deziras korespondi kun Franco pri kulturaj aferoj S-ro Manuel Romero Gomez, Arzobispo Apaolaza, 32-ent. A, ZARAGOZA, Hispanujo.

2) Se vi deziras testamenti vian korpon al la Medicina Fakultato, skribu al : M. le Directeur Scientifique de l'Amphithéâtre d'Anatomie des Hôpitaux, 17, rue du Fer-à-Moulin, 75005 PARIS. Post forpreno de la interesaj organoj, la korpoj estas cindrigitaj.

## G A Ŭ D E A M U S

Antaŭ 55 jaroj komencis sian pedagogian laboron Katolika Universitato en Lublin. La 21-an de oktobro ĝi solene celebris ĉi tiun datrevenon. La Sanktan Meson inaŭguran celebris en ĉi tiu tago Kardinalo G. GARONNE (Italujo). Predikis Kardinalo S. WYSZYNSKI, primaso de Pollando. Inter partoprenantoj estis interalie : Kardinalo K. WOJTYLA (Krakow), ĉefepiskopo A. BARANIAK (Poznan) kaj aliaj anoj de la pola episkoparo, pastraro, reprezentantoj de superaj lernejoj de Dublin, gastoj el Varsovio, gestudentoj de la Katolika Universitato en Lublin.

Prorektoro Prof. Dr Stefan SAWICKI raportis pri la pedagogia laboro de l'Universitato kaj pri ĝia aktiveco en akademia jaro 1972/73a. Inaŭguran prelegon faris sacerdoto Dr Stanislaw NAGY, docento de Katolika Universitato, pri "Doktrina dialogo en nuntempa ekumena movado". Rektoro de l'Universitato sacerdoto Prof. Dr. Mieczyslaw A. KRAPIEC konstatis, ke dank'al polaj kaj eksterlandaj fifeluloj, dank'al kardinalo primaso kaj al pola episkoparo, dank'al amikoj de la Universitato, ĝi povas vivi, labori, instrui kaj eduki polan katolikan eliton.

Fine de la solena ceremonia Kardinalo GARONNE, prefekto de Kongregacio "Pro intitutione catholica", konstatis, ke pola popolo profunde kredas en Dio, ke polaj sanktejoj estas plenaj je fideluloj. Li esprimis sian ĝojon, ke li povas partopreni en la akademio inaŭguranta novan, 1973/1974-an jaron de universitataj studoj. Kardinalo GARONNE deziris al profesoroj, administraro kaj al gestudentoj prosperon kaj multajn sukcesojn.

Sac. Dr. Zbigniew KUCEWICZ
Pollando.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

## N I A   M E M B R A R O .

NEKROLOGO : fine de 1973 forlasis nian mondon tre malnova ano, S-ro Malinvaud el Aix-en-Provence, kaj S-to Rederstorff, eks-misiisto en Afriko. Ni preĝu por la ripozo de iliaj animoj.

NOVAJ MEMBROJ 1974 : 4) S-ino CAMY (Yvelines); 5) F-ino ERGOLL (L.-A.) 6) S-ro BRISSOT (Val de Marne); S-to de l'ESCALE (M.& M.); 8) S-ro PROVOST (L.A.); 9) S-ro GODART (Vosges); 10) S-ino ARLEN (Moselle). Koran bonvenon al tiuj novaj gefratoj.
MEMBROJ SUBTENANTOJ 1974 : 2) F-ino ESPRIT (Hte M.); 3) S-ro BELIARD (L.A.); 4) S-ro LE MARQUAND (C-du-N.); Dakon pro ilia grava helpo.

==========================================

NIA KONGRESO EN ANGERS 11/12-an de majo 1974

PROGRAMO.

SABATON POSTTAGMEZE : Estus tre dezirinde, ke la kongresanoj tuj skribu al S-to Goudé, kiun temon ili deziros pritrakti en la diskutrondetoj.

VESPERE : S-to G. Baudry, profesoro en Lille, parolos pri "Des nationalismes à l'universalisme selon Teilhard de Chardin.

DIMANĈON : JARKUNVENO DE FKEA.

Instrukcioj por la balotado : estas 6 kandidatoj por 6 lokoj. Bonvolu enmeti la ĉi suban voĉdonilon en koverton kun indiko "Voĉdonado FKEA". Tiun fermitan koverton enŝovu la alian, afrankitan je 0,50 Fr, kiun vi sendu al S-ro R. Despiney, 43, quai de Champagne, 94170 LE PERREUX SUR MARNE, antaŭ la 8-a de majo 1974. Skribu dorsflanke vian nomon kaj adreson.

Se vi ne partoprenos la kongreson, bonvolu krome resendi la ĉi suban rajtigilon, en la sama (dua) koverto.

===================================================================

VOĈDONILO

1) S-ro BARRIER Jean (Drancy)
2) S-to BOURDON Louis (Lille)
3) S-to DEGRELLE Roger (Nancy)
4) S-ino MICHAU Jeanne (Orléans)
5) S-ro VERON Gaston (Domfront)
6) S-ino VINCENT Jeannine (Les Andelys)

===================================================================

RAJTIGILO

Mi subskribinta (nomo, voknomo) ...................... .........
ne povante partopreni la kongreson, transdonas mian povon al .......
............................ por ĉiuj decidoj kaj voĉdonoj farotaj al la asocio.

Antaŭ via subskribo, kribu : " Bon pour pouvoir "

Dato kaj subskribo :

===================================================================

D I S T R A A N G U L O.

Solvo de la krucvortenigmo N 5 : HORIZONTALE : 1) melodioj; 2) amerika; 3) tempouzo; 4) er, a, sol; 5) ni, ve, e; 6) atribute; 7) armeo, c; 8) ajlon, ja;
VERTIKALE : 1) matena, a; 2) emeritaj; 3) lem, rrl; 4) orpavimo; 5) dio, eben'; 6) ikue, uo; 7) cazo, t, j; 8) j, oleeca.

N.D.L.R.- Atendante novan materialon por la distra paĝo, ĉi tiu iĝis hodiaŭ nur angulo.

===================================================================

.../...

Por atingi ANGERS pervagonare :

| | PARIS-MONTPARNASSE | | ANGERS |
|---|---|---|---|
| vendrede (suplemento : 7 Fr en 2-a kl.) | 18.29 | (manĝvagono) | 21.6 |
| ĉiutage | 19.21 | ( " ) | 22.7 |
| vendrede | 20.40 | | 23.31 |
| ĉiutage | 8.35 | (manĝvagono) | 11.26 |
| semajne | 11.15 | ( " ) | 13.46 |
| ĉiutage | 13.45 | ( " ) | 16.28 |
| | **NANTES** | | **ANGERS** |
| ĉiutage | 9.4 | | 9.45 |
| " " | 10.36 | (manĝvagono) | 11.17 |
| semajne | 11.5 | ( " ) | 11.46 |
| ĉiutage | 12.45 | | 14.7 |
| " | 13.45 | (manĝvagono) | 14.32 |
| " | 14.27 | ( " ) | 15.8 |
| " | 15.40 | | 16.42 |
| " | 16.49 | (manĝvagono) | 17.30 |
| " | 17.52 | | 19.9 |
| " | 18.45 | (manĝvagono) | 19.33 |
| semajne | 19.8 | | 20.37 |

| REVENO | ANGERS | PARIS |
|---|---|---|
| ĉiutage | 14.35 (manĝv.) | 17.31 |
| " | 16.44 (ŝanĝi Le Mans) | 19.46 |
| dimanĉe | 18.1 (manĝv.) | 20.54 |
| ĉiutage | 19.36 ( " ) | 22.23 |

| | ANGERS | NANTES |
|---|---|---|
| ĉiutage | 16.31 | 17.18 (manĝv.) |
| " | 16.45 | 17.27 ( " ) |
| " | 17.30 | 18.37 |
| " | 18.35 | 19.50 |
| " | 19.31 | 20.12 (startrinkejo) |
| (kun suplemento 7 Fr en 2-a kl.) | | |
| ĉiutage | 20.42 | 21.34 (manĝv.) |

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

## K O T I Z T A B E L O 1 9 7 4

FrFrFrFrFrFrFrFrFrFrFrFrFrFrFrFrFrFrFrFrFrFrFrFrFrFrFrFrFrFrFrFrFr

IKUE kun "Espero Katolika" ........................ 21 Fr
IKI kun "Vojo, Vero, Vivo" ........................ 5 Fr
Peranto : G. Véron , C.C.P. - ROUEN - 11 88 63 Z.-

ACFE kun "Franca Katolika Esperantisto" ........... 6 Fr
Infano malpli ol 16-jara .......................... 3 Fr
Membro bonfaranto ................................. 30 Fr
Dumviva membro .................................... 120 Fr
UFE kun "Revue Française " ........................ 50 Fr
UEA kun "Esperanto" kaj "Jarlibro" ................ 68 Fr

C.C.P.-Association Cath. Franç. pour l'Espéranto,-ROUEN - 23 24 93 N.-

=+=+=+=+=+=+= FrFrFrFrFrFrFrFrFrFrFrFrFrFr ££££££££££££££ $$$$$$$$$$$ FrFrFrFrFrFrFrFr =+=+=

==============================================================

Dépôt légal : 2° trimestre 1974 /// Polycopié par : F.M.C.-
Papier de Presse N° 34.745- /// Prieuré Saint-Martin
Directeur-Gérant : Gaston VERON /// LA HOUSSAYE EN BRIE
/// 77610 FONTENAY TRESIGNY
FRANCE

==============================================================